

XXVI ORDINARA DIMANĈO- 27an de Septembro 2009

KIU NE ESTAS KONTRAŬ NI ESTAS POR NI. SE VIA MANO FALIGAS VIN, FORTRANĈU ĜIN

Komentario al la Evangelio de p. Alberto Maggi OSM

MK. 9, 38-43, 45, 47-48

[En tiu tempo] Johano diris al li: **Majstro, ni vidis iun elpelantan demonojn en via nomo; kaj ni malpermesis lin, ĉar li ne sekvas nin. Sed Jesuo diris: Ne malpermesu lin; ĉar neniu, kiu faros miraklon en mia nomo, povos facile paroli malbone pri mi. Ĉar tiu, kiu ne estas kontraŭ ni, estas por ni. Ĉar kiu donos al vi trinki tason da akvo, pro tio, ke vi apartenas al Kristo, vere mi diras al vi, tiu neniel perdos sian rekompencan. Kaj kiu igos fali unu el ĉi tiuj malgranduloj, kiuj kredas al mi, estus pli bone por tiu, se granda muelŝtono estus pendigita ĉirkaŭ lia kolo, kaj se li estus ĵetita en la maron. Kaj se via mano faligas vin, detranĉu ĝin: estas bone por vi eniri en vivon kripla prefere ol, havante du manojn, eniri en Gehenan, en la neestingeblan fajron, Kaj se via piedo faligas vin, detranĉu ĝin: estas bone por vi eniri en vivon lama prefere ol, havante du piedojn, esti ĵetita en Gehenan, kie ilia vermo ne pereas kaj la fajro ne estingiĝas. Kaj se via okulo faligas vin, elŝiru ĝin: estas bone por vi eniri en la regnon de Dio kun unu okulo prefere ol, havante du okulojn, esti ĵetita en Gehenan, kie ilia vermo ne pereas kaj la fajro ne estingiĝas.**

Jesuo estis doninta al siaj disĉiploj la povon liberigi la homojn el la demonoj, t. e. liberigi ilin el tiu idearo kiu malhelpas akcepti la mesaĝon de la Bona Novaĝo [La Evangelio]. Nu, ili ne nur ne kapablas tion fari, sed ili arogantece klopodas haltigi tiujn kiuj tion faras.

Johano la Evangeliisto, kune kun sia frato Jakobo, Jesuo alinomis “filojn de tondro” en la aramea lingvo “Boanerges”(3, 17) kiu donas la ideon de tondro pro ilia fanatikeco kaj pro iliaj malmodero kaj violento - fakte, skribas la Evangeliisto prezentinte al ni Sanktan Johanon kiu sin turnas al Jesuo dirante: ”Majstro, ni vidis iun elpelantan demonojn en via nomo”. “En la nomo de Jesuo” (ἐν τῷ ὀνοματί σου) tio ne signifas uzi la formularon de la nomo de Jesuo, sed identiginte sin kun Jesuo.

“Kaj ni malpermesis lin”, kaj ni aŭdas la motivadon, ”ĉar li ne sekvas nin”. Li ne povas diri ĉar li ne sekvis vin”, ĉar li agas en la nomo de Jesuo, sed “li ne sekvis ilin”. Ili pretendas ke ĉiuj sekvantoj de Jesuo apartenu al la grupo de la disĉiploj.

Nu, Jesuo plivastigas la horizonton de sia komunumo kaj li diras “Ne malpermesu lin”- kaj tio estas imperativa (Μὴ κόλπετε αὐτόν)- “ĉar estas neniu kiu agas per forto –

tiu estas la signifo de la uzita vorto (δύοαμιν) – “en mia nomo” (ἐπί τῷ ὀνόματί μου), t.e. identigante sin kun mi “kaj kiu tuj poste povos facile paroli malbone pri mi”.

“Tiu, kiu ne estas kontraŭ ni, estas por ni”. Do, Jesuo agnoskas ke povas ekzisti siaj disĉiploj eĉ se ili ne apartenas al la grupo kiu pretendas monopoligi lian instruadon. Kaj poste Jesuo invitas ankaŭ la disĉiplojn sin identigi kun Li: fakte Li diras: ”kiu donos al vi trinki tason da akvo pro tio, ke vi apartenas al Kristo,” – do Li invitas ankaŭ ilin sin identigi kun Li, ĉar ili tion ankoraŭ ne faris - “tiu neniel perdos sian rekompenco”.

La ĉeesto de Jesuo kaj tiu de Sia Patro estos la rekompenco por kiu Lin akceptas.

Sed, tuj poste Jesuo, fronte de tiu atako fare de Sankta Johano, per kiu la disĉiplo eĉ ĝenis Lian gravan paroladon pri la servo, jen Jesuo kiu ilin admonas. “Kiu skandalas”, t.e. kiu igos fali “unu el ĉi tiuj malgranduloj”.

Kiuj estas tiuj malgranduloj? La greka teksto uzas la vorton Mikron (μικρων) kiu ne indikas la infanojn sed la nulojn, ĝi indikas la flankenmetitojn, la sensignifajn personojn en la tiutempa medio. “Kiuj kredas al mi”, do ili ne estas infanoj; ili estas plenkreskuloj kiuj donis sian konsenton al Jesuo, sed estas malgravuloj.

Nu, la vortoj de Jesuo estas teruraj, ili estas dramaj: se iu el vi igos fali unu el ĉi tiuj malgranduloj, kiuj kredas al mi, el tiuj homoj kiuj aŭdis paroli pri frateca mesaĝo kaj kontraŭe ili vidos ke inter vi estas disigoj - nu la vortoj de Jesuo estas teruraj - “estus pli bone por tiu, se muelilo estus pendigita ĉirkaŭ lia kolo, kaj tio povis sufiĉi, kontraŭe Jesuo precizigas, “granda muelŝtono”.

Estis du specoj da mueliloj, unu estis tiu hejma, kiun la dommastrino turnis mem, kaj la alia estis muelŝtono kaj utilis por la olivmuelilo kaj tiu ĉi estis peza, “kaj se li estus ĵetita en la maron.” Kial Jesuo donas tiujn ĉi indikojn? Jesuo diras ke tiu ulo devas definitive malaperi kaj por sin certigi ke li definitive malaperas li devas esti ĵetita en la maron, sed kun granda muelŝtono pendigita ĉirkaŭ lia kolo. Kial? La hebreoj timegis morti dronintaj; ili opiniis ke se oni mortis droninta oni ne havis esperon pri resurekto.

Tiam Jesuo diras ke ne sufiĉas ĵeti en la maron tiun ĉi fiulon, ĉar poste la korpo povos elakviĝi, tiam oni devas eviti ke la korpo elakviĝu por esti poste entombigita. Do la vortoj de Jesuo estas vere teruraj.

Kaj poste Jesuo donas serion da avertoj al sia komunumo kaj Li diras: “Se via mano”, poste Li parolos pri la piedo kaj pri la okulo; la mano indikas la aktivecon, la piedo indikas la sintenon, la okulo indikas la regulo per kiuj oni rigardas la vivaĵojn. “estas por vi skandala”, tio estas ĝi faligas vin, Jesuo estas radikala “fortranĉu ĝin!” Etas bone por vi eniri en vivon kripla prefere ol, havante du manojn, eniri en Gehenan”.

Kio estas tiu Gehena? “Gêhinnôm” signifas Valo de Hinnom; ĝi estis kaj estas krutaĵo kiu troviĝas sude de la templo de Jeruzalemo, kaj kiu en la tempo de Jesuo estis uzita kiel publikan rubejon. Tiuj ĉi rubaĵoj estis senĉese amasigitaj kaj poste bruligitaj por ilin komplete elimini. Do Jesuo diras: ”estas pli bone, eĉ se dolorige ke vi fortranĉu ion kiu malhelpas vin havi la plenan de vivo, ol eniri la publikan rubejon de Jeruzalemo.”

Kaj tiel plu, Jesuo priparolas la piedon, priparolas la okulon. Kaj jen la fino; Li diras: “Estas pli bone por vi ĉion tion, ol esti ĵetita en la Gehenan”, kaj Jesuo tie ĉi citas la finon de la libro de Jesaja (66, 24): ”kie ilia vermo ne pereas kaj la fajro ne estingiĝas”.

Jesuo ne estas parolanta pri postmorta puno, tute kontraŭe. La fino de la libro de Jesaja bildigas la punon por la izraelidoj kiu estis malfidelaj. La maniero elimini la kadavrojn estis duobla: unuflanke estis ĝia putriĝo, kaj aliflanke estis ĝia kremacio. Nu tie ĉi la profeto ilin kunmetas, ”ilia vermo ne pereas”, do la putriĝo estas komplete, kaj “la fajro ne estingiĝas”, do la kremacio estas komplete.

Tio signifas la tutan detruon. Aŭ oni eniras kun Jesuo en la pleno de la vivo, aŭ, kiam alvenas la fizikan morton, ĝi trovas korpon malplenigita je vivo kaj tia estas kiu en la Apokalipso (2,11;20,6.14; 21,18) nomiĝas “la dua morto”, la tuta fino de la individuo.